



Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main e.V.
gegründet 1904 – fondita 1904

februaro 2014

ESPERANTO - INFORMILO

Lev Nikolajevič Tolstoj (1828-1910)

Esperanto-
Gesellschaft
Frankfurt am Main

www.esperanto-frankfurt.de

1. Vorsitzende
Katarina Eckstädt
Geschw.-Scholl-Str. 1
63486 Bruchköbel
Tel. 06181 76343

Bankverbindung:


Esperanto-Gesell-
schaft Frankfurt
K-to-Nr. 771571701
BLZ 500 800 00

Commerzbank
Frankfurt/Main

Beitrag:

Mit DEB-Beitrag 80 €
Familienmitglied 40 €

Nur ESF 20 €
Familienmitglied 10 €



La leteron de la granda rusa verkisto, en kiu li publikigis
sian opinion pri Esperanto, vi povas legi en ĉi-tiu numero.
Supre: portreto de Tolstoj farita de Ilja Repin 1887

einladung zum klubabend

invito al la klubvespero

Bürgertreff Bockenheim
Schwälmer Str 28
Frankfurt am Main

donnerstag, d. 2.1.2014

ĵaŭdon, la 2an de jan. 2014

Liebe Mitglieder, Freunde und Interessenten,
wir laden Sie zum nächsten Klubabend ein,
der am Donnerstag, den **2. 1. 2014** stattfinden wird.

Karaj membroj, geamikoj kaj interesiĝantoj,
ni invitas vin al la venonta klubvespero, kiu okazos ĵaŭdon, la **2an de januaro 2014**.

18.30 h

babbelabend

babila vespero



Mi fotis...

Kiam mi estis en...

Mi legis...

Mia hobio...
Kien ni ekskursu?
Kiel oni diras...?

donnerstag, den 16.1.2014

ĵaŭdon, la 16an de jan. 2014

18.30 h

babbelstunden

babilaj horoj

geburtstage im januar

naskiĝtagoj en januaro

Elisabeth Rabenstein, 11.01.

Reinhard Pflüger, 16.01.

Martin Schmitt, 21.01.

Helga Perlwitz-McMahon, 30.01.

ni gratulas!

kalender 2014

kalendaro 2014

Liebe Mitglieder,

wir senden Ihnen den Kalender unserer Veranstaltungen für das Jahr 2014.

Besondere Hinweise:

1. **Die Mitgliederversammlung** wird in diesem Jahr am **dritten Donnerstag** im März (**20.3.2014**) stattfinden. Da verschiedene Mitglieder des Vorstandes weder im Februar noch im März teilnehmen können, wir aber nach unserer Satzung unsere Mitgliederversammlung bis Ende März abhalten müssen, hat der Vorstand beschlossen, die Mitgliederversammlung am **dritten Donnerstag** im März (**20.3.2014**) einzuberufen.
Wir bitten alle Mitglieder, an der Versammlung teilzunehmen.
2. Die Saalbau hat uns mitgeteilt, dass sie in diesem Jahr **vom 18. August bis 7. September Ferien** machen. Das bedeutet für uns, dass wir am dritten Donnerstag im August und am ersten Donnerstag im September keine Veranstaltungen haben werden.
3. Die Termine für den Ausflug und das Sommerfest werden wir bei der Mitgliederversammlung festlegen.

Hier die Termine für das Jahr 2014:

Januar: 2. und 16.

Juli: 3. und 17.

Februar: 6. und 20.

August: 7.

März: 6. und 20.

September: 18.

April: 3. und 17.

Oktober: 2. und 16.

Mai: 15.

November: 6. und 20.

Juni: 5.

Dezember: 4. und 18.

gefunden

von/de s-ro Caragea

trovita

Am 15. Dezember 2013 rief mich Herr Caragea an und teilte mir mit, dass sich in dem Teletext der ARD zwei Seiten über den Tag des Buches befinden: eine in Deutsch und eine andere in Esperanto.

Auf den Seiten wurde über Zamenhof geschrieben und die Entstehung von Esperanto. Wir danken Herrn Caragea für diesen Hinweis.

La 15an de decembro telefonis al mi nia membro s-ro Caragea kaj informis min, ke la televida teksto de la unua tv-programo (ARD) enhavas okaze de la Tago de Libro du paĝojn da teksto: Unu en la germana alia en Esperanto. La paĝojn donis informojn pri Zamenhof kaj La ekesto de Esperanto.

Ni dankas al s-ro Caragea por ĉi-tiu informo.

ke.

Wir haben alle gehört, dass der berühmte russische Schriftsteller Tolstoi Esperanto gelernt hat. Aber wir wissen (meist) nicht mehr.

In unserer Bibliothek befindet sich ein Buch „La Esperantisto 1889-1895“. Es ist der Reprint der ersten Esperanto-Zeitschrift „La Esperantisto“, die zwischen 1889 und 1895 in Nürnberg erschien.

Jemand (wahrscheinlich Ulrich Fellmann) hat einen Zettel in das Buch geklebt, auf dem man lesen kann: „Bitte schonend behandeln!“ Guter Rat! Das Buch ist eine Schatzkammer, in der man Artikel und originale und übersetzte Literatur finden kann. Es ist aber auch interessant zu sehen, woher die meisten Abonnenten kamen, wer für seine Produkte warb, usw. Da fanden wir auch den Artikel von Tolstoi, in dem er seine Meinung über Esperanto äußert. Wir hoffen, er ist auch für Sie interessant.

Ni ĉiuj aŭdis, ke la fama rusa verkisto Tolstoj lernis Esperanton. Tamen ni ne sciis eĉ iomete pli pri tio. En nia biblioteko troviĝas la libro „La Esperantisto 1889-1895“. Ĝi enhavas la represon de la unua Esperanto-periodaĵo „La Esperantisto“ aperinta en Nurenbergo inter 1889 kaj 1895.

Iu (verŝajne Ulrich Fellmann) gluis papereton en la libron, sur kiu oni povas legi: „Bv. trakti zorgo!“ Bona konsilo! La libro estas trezoro, en kiu oni povas trovi artikolojn, originalan kaj tradukitan literaturon. De kie estis la plej multaj abonantoj, kiu varbis por siaj produktoj estas same interesaj. Tie ni trovis ankaŭ la artikolon de Tolstoj, en kiu li esprimas sian opinion pri Esperanto.

Ni esperas, ke ĝi estas interesa ankaŭ por vi. Ni presas la leteron nur en Esperanto. Ĝi jam estas tradukita el la rusa en Esperanton.

brief von Tolstoi

letero de Tolstoj

Kelkaj esperantistoj sendis al la glora rusa verkisto grafo L. N. Tolstoj leteron kun peto esprimi sian opinion pri Esperanto. Nun la redakcio de «Posrednik» transsendis al ni kopion de la letero, per kiu L. N. Tolstoj respondis al la farita demando. La letero de Tolstoj estas tre grava, kaj ni petas niajn amikojn, ke ili penu presigi la tradukon de tiu ĉi letero en multaj gazetoj de iliaj landoj. Estus dezirinde, ke tiu ĉi letero aperu en la gazetoj kune kun klariga antaŭparolo pri la esenco de nia lingvo. Jen estas la letero de Tolstoj:

«Estimataj sinjoroj! Mi ricevis vian leteron kaj penos, kiom mi povos, plenumi vian deziron, t. e. eldiri mian opinion pri la penso de lingvo tutmonda entute kaj pri tio, kiom la lingvo Esperanto respondas al tiu ĉi ideo.

Pri tio, ke homoj celas al tio, por fari unu anaron kun unu paŝtisto de prudento

kaj amo kaj ke unu el la plej proksimaj kondukantaj ŝtupoj por tio ĉi devas esti reciproka komprenado de la homoj unu alian, — pri tio povas ekzisti nenia dubo. Por tio, ke homoj komprenu unu la alian, estas necese aŭ tio, ke ĉiuj lingvoj per si mem kunverŝiĝu al unu lingvo (kio, se ĝi fariĝus iam, povus fariĝi nur post tre longa tempo), aŭ tio, ke la sciado de ĉiuj lingvoj tiel vastiĝu, ke ne sole ĉiuj verkoj estu tradukitaj en ĉiujn lingvojn, sed ankaŭ ke ĉiuj homoj sciuj tiom multe da lingvoj, ke ĉiuj havu la eblon komunikiĝi unu kun la alia en tiu aŭ alia lingvo, aŭ tio ke ĉiuj elektu unu lingvon, kiun devige lernus ĉiuj popoloj, aŭ fine tio (kiel supozas la volapükistoj kaj esperantistoj), ke ĉiuj homoj de diversaj nacioj akceptu unu arte faritan facili-gitan lingvon internacian kaj ĉiuj lernu ĝin. En tio ĉi konsistas la ideo de la esperantistoj. Ŝajnas al mi, ke tiu ĉi lasta supozo estas la plej prudenta kaj — la plej grava — la plej facile efektivigebla.

Tiel mi respondas la unuan demandon. La duan demandon, — en kia grado la lingvo Esperanto kontentigas la postulojn de lingvo internacia, — mi ne povas respondi tute decide, ĉar mi ne estas kompetenta juĝanto en tio ĉi. Unu, kion mi scias, estas tio, ke Volapük aperis por mi tre komplikita, Esperanto do, kontraŭe, tre facila, kiel ĝi devas aperi al ĉiu Eŭropa homo. (Mi pensas, ke por tutmondeco en absoluta senco de tiu ĉi vorto, t. e. por ligi inter si Hindojn, Ĥinojn, popolojn Afrikajn k. t. p., estos necesa alia lingvo, sed por homo Eŭropa Esperanto estas tre facila). "La facileco de ĝia lernado estas tiel granda, ke, ricevinte antaŭ ses jaroj Esperantan gramatikon, vortaron kaj artikolojn, skribitajn en tiu ĉi lingvo, mi post ne pli ol du horoj de okupado povis jam, se ne skribi, almenaŭ libere legi en tiu ĉi lingvo.



W.H. Trompeter, eldonisto de „La Esperantisto“



La naskiĝdomo de Tolstoj
en Jasnaja Poljana

En ĉia okazo la oferoj, kiujn alportos ĉiu homo de nia Eŭropa mondo, dediĉinte kelkan tempon por la lernado de tiu ĉi lingvo, estas tiel malgrandaj, kaj la sekvoj, kiuj povas veni, se ĉiuj, — almenaŭ la Eŭropanoj kaj Amerikanoj — ĉiuj kristanoj, — ellernos tiun ĉi lingvon, estas tiel grandegaj, ke oni ne povas ne fari tiun ĉi provon. Mi ĉiam pensis, ke ekzistas nenia pli kristana scienco, ol la sciado de lingvoj, tiu sciado, kiu donas la eblon komunikiĝi kaj ligiĝi kun plej granda nombro da homoj. Mi vidis multajn fojojn, kiel homoj tenadis sin malamike unuj kontraŭ la aliaj nur dank' al la meĥanika malhelpo por reciproka komprenado. Kaj tial la lernado de Esperanto kaj la vastigado de ĝi estas sendube kristana afero, kiu helpas al la kreado de la Regno de Dio, tiu afero, kiu estas la ĉefa kaj sola difino de la homa vivo.

27. Aprilo 1894.

Lev Tolstoj

neues mitglied

nova membro



Manfred Sailer (dekstre) en „Albatroso“ kun niaj membroj.

Manfred Sailer

Li venis al „Albatroso“ kaj demandis, ĉu ni estas frankfurtaj esperantistoj. Ek de tiam li venadas dum la universitata semestro regule. Li estas lingvisto kaj instruas ĉe la universitato en Frankfurto.

Li iĝis nia membro sen nia varbado, li simple diris, ke li deziras esti nia membro. Ni ĝojas kaj diras al li:

BONVENON!

gefunden

von/de s-ino Kruse

trovita

Nicht schlecht staunten die Touristen, als sie am Portal einer südspanischen Kathedrale folgenden Anschlag lasen: „Der Dompropst heißt alle Gäste herzlich willkommen! Er möchte aber dringend darauf hinweisen, dass im Inneren der Kirche keine Gelegenheit zum Schwimmen besteht. Es ist daher zwecklos, das Gotteshaus in Strandkleidung oder gar im Bikini zu betreten.“

(©Pattloch Verlag GmbH & Co.KG, München)

La turistoj miregis, kiam ili trovis ĉe la portalo de sudhispana katedralo afiŝon kun sekvanta teksto: „ La ĉefpastro de nia katedralo bonvenigas ĉiujn gastojn. Li deziras tamen atentigi, ke en la preĝejo ne ekzistas okazo por naĝi. Tial estas senutile eniri en la preĝejon vestita per ŝtrandaj vestaĵoj aŭ eĉ per bikino.“

(©Pattloch Verlag GmbH & Co.KG, München)

Estas facile suprenporti malplenan kapon.

Es ist leicht, einen leeren Kopf hoch zu tragen.

Sprichwort aus Libanon

Ni dankas al s-ino Kruse.

Proverbo el Libano

Versaĵo sen fino

Lin vidis en ĝardeno-
Ekplaĉis li al ŝi,
Ŝi nomis sin Heleno
Anton' sin nomis li.

Ekamis la konato,
Kaj reciprokis ŝi,
Post paso de monato
Ŝanĝiĝis „Vi“ per „ci“.

Someraj tri monatoj
Trapasis dolĉe for,
Kaj niaj geamantoj
Jam estis kor' ĉe kor'.

Kaj per solena beno
De l'pastro en la fin'
Antonio kaj Heleno
Jam estis edz'-edzin'.

En ĉarma harmonio
Ekvivis edz'-edzin',
Najbaroj kun envio
Rigardis lin kaj ŝin.

Sed baldaŭ edzo estis
Plej malfeliĉa hom',
Kaj jam tre ofte restis
Li ekster sia dom'.

Kaj fine eksedziĝis
Antonio kaj Helen':
Belul' ia aliĝis
Al ŝi en la ĝarden

Lin vidis en ĝardeno-
Ekplaĉis li al ŝi,
Ŝi nomis sin Heleno
Aŭgust' sin nomis li.

Ekamis la konato,
Kaj reciprokis ŝi,
Post paso de monato
Ŝanĝiĝis „Vi“ per „ci“.

Someraj tri monatoj
Trapasis dolĉe for,
Kaj niaj geamantoj
Jam estis kor' ĉe kor'.

Kaj per solena beno
De l'pastro en la fin'
Aŭgusto kaj Heleno
Jam estis edz'-edzin'.

En ĉarma harmonio
Ekvivis edz'-edzin',
Najbaroj kun envio
Rigardis lin kaj ŝin.

Sed baldaŭ edzo estis
Plej malfeliĉa hom',
Kaj jam tre ofte restis
Li ekster sia dom'.

Kaj fine eksedziĝis
Aŭgusto kaj Helen':
Belul' ia aliĝis
Al ŝi en la ĝarden'.



Lin vidis en ĝardeno-
Ekplaĉis li al ŝi,
Ŝi nomis sin Heleno
Henrik' sin nomis li. ...

K. t. p., k. t. p. sen fino.

Feliks Zamenhof



kristnaska festo



Multaj diligentaj manoj helpis, ke nia tablo estu bele ornamita, kaj ke ĉio bongustas.



Rakonti, legi, kanti, aŭskulti muzikon



Ges-roj
Ullmann



Ges-roj Stoessel kaj Rabenstein foliumas en la libro, kiun s-ro R. ricevis de niaj duoblaĵoj.
Ges-roj Stecay kaj Fellmann pri-diskutas eblajn aktivecojn.



Feliĉan novan jaron!